

Ĉu perditte inter fundamenta kaj plena gramatikoj?

Pri radikalaj kaj duonaj renomadoj.

Atenta leganto iom observema kaj lingve konscia baldaŭ rimarkas, ke aŭtoroj – krom la komuna baza gramatiko – aplikas ankaŭ personajn regulojn; ĉar ili devas: ekzistas sintakse-semantikaj problemoj iel solvendaj. Beletristoj ja povas konfrontiĝi kun kolizio de du reguloj. Tiajn lingvajn nodojn – pro manko de koncerna regulo – ĉiu solvas per iuj signifoportaj gramatikaĵoj, laŭ propra bontrovo.

Elire ni konstatas do, ke troviĝas pluraj opinioj, malsamaj vidpunktoj pri gramatiko; ke lingvistoj malakordas, gramatikistoj kverelas inter si, kaj verkistoj do diversmaniere solvas siajn renkontitajn esprimproblemojn.

Komenco kaj sekvoj

El la sporoj ŝutitaj de la Zamenhofa *Unua Libro* – ‘triobla ĝermo de nia lingvo, de nia movado kaj de nia literaturo’ – kreskis la *Fundamento*. ‘Broŝuro,’ skribis Warinĝien, ‘tiel humila en ĝia prezentiĝo, tiel modesta en ĝia formulado, sed tiel gravega pro la kvanto da estonteco, kiun ĝi entenas.’ Kaj jes, poste vico da plenetaĵoj, plenaj kaj plenegaj vortaroj kaj gramatikoj elsaltis funge el la sterkita grundo. Sed malgraŭ sterkado daŭra per literaturo kaj beletro, neniu gramatiko montriĝas kompleta, ĉu ĝi venis ‘klasika’ (kun latina terminologio), ĉu ‘novkoncepta’ (kun memstara terminaro surbaze de la propra karaktero kaj naturo de la lingvo). La 16-regula gramatiko de Zamenhof, lingvosistema **resumo**, estas rezulto de lia genia penso: strebo al facileco. Li konsciis pri provizora sufiĉo, antaŭvidante postan evoluon.

La *Plena Analiza Gramatiko* (600 p.) de Kalocsay kaj Waringhien, farita laŭ la modelo latina, estis la unua granda paŝo antaŭen kaj servis kiel modelo por aliaj gramatikoj. Ĝian unuan eldonon en 1935, *Plena Gramatiko de Esperanto; Vorto kaj Frazo*, sekvis tralaborita kaj kompletigita eldono; mi uzas la kvaran el 1980. Dume, en laboristaj medioj uzata ekde 1932-33, famiĝis en Nederlando kaj Flandrujo *Tra la labirinto de la gramatiko* de Faulhaber. Kaj sendube en multaj landoj aperis ia Esperanto-gramatiko en nacia lingvo, kiel ankaŭ en Valonujo, la franclingva parto de Belgio, kie sukcesa verko estis tradukita al Esperanto: *ABC-gramatiko de Esperanto* (Emile Van Damme kaj Christiane De Vleminck). “Moderna ampleksa Esperanto-gramatiko en kiu lernantoj (kaj lernintoj) povas facile trovi respondon pri ajna gramatika problemoj. La temoj estas ordigitaj alfabeto, do multe pli superrigardeble ol en PAG. La dukolumna prezento (dekstre klarigoj; maldekstre, trafaj ekzemploj), la evitado de tro teknikaj gramatikaj terminoj...” kaj kotopas la reklama teksto.

Tra la jaroj ariĝis, aldone al la menciita PAG, jenaj, ĉiuj kun la sama baza terminologio:

Gramatiko de Esperanto, verkita en la korea de Bak Giŭan, tradukita de Kim U-son, 1994 (152 p.): “Mia libro diferencas je diversaj punktoj ol PAG. Precipe la strukturo de gramatiko estas radikale malsama, kaj tial mi bezonis novajn gramatikajn fakvortojn. Sed ni devas scii, ke nia lingva vivo persistas sen ajna ŝanĝo, senkonsidere kiom da gramatikistoj starigas kiom da gramatikaj sistemoj. Alivorte, kiel ajn ni klarigas la gramatikon de Esperanto, senŝanĝe restas nia ĉiutaga Esperanto. Ni povas diri, ke gramatiko estas la ordigo kaj strukturigo de realaj lingvaj fenomenoj.”

Gramatiko de Esperanto de Miroslav Malovec. 2000, 2a. Detala kaj tradicia (135 p.). "Malnovskola prezento havas la avantaĝon, ke ĝin komprenas personoj edukitaj laŭ tiu sistemo. La malavantaĝo estas, ke ĝi plene ignoras la lingvikon de la pasintaj cent jaroj."

Kompendio de la Esperanta gramatiko (por superaj ekzamenoj) de Mirko Manner-Mamuĵiĉ kaj Ivo Boroveĉki (109 p.) El plia recenzo de Broadribb: "La verkintoj konfuzas semantikon (signifo de vorteroj), morfologion (konstruformo de vortoj) kaj kategoriojn de verboj."

Parolante pri gramatikoj, ĉu ni sufiĉe distingas inter la regularo kaj la terminaro? Cetere, ni ne forgesu: verkiĝis ne nur gramatikoj, sed ankaŭ apartaj kontribuoj pri gramatikaj temoj: *Lingvo kaj vivo*, esearo (Waringhien); *Du malsanoj en Esperanto* (de Hoog); *La Zamenhofa Esperanto*, simpozio pri -ATA / -ITA (11 aŭtoroj); *Vojaĝo inter la tempoj* (Kalocsay); *Materialoj pri la nuna uzado de la akuzativo* (Moirand); *La interna vivo de Esperanto* (Piĉ); *Apartaj mondoj: verboj kaj participoj* (Mattos); kaj aliaj.

Alblovo de novo

"Zamenhof, eksperto pri la hebrea lingvo kaj konanto de la jida, konstruis Esperanton laŭ la baza skemo de semidaj lingvoj pli ol laŭ gramatik-elementoj hindeŭropaj, kaj tio necesigas ke ni liberiĝu el la vitraj ŝuoj en kiujn penis enŝovi nian cindrulinan Esperanton niaj tradiciaj gramatikistoj," skribis Broadribb.

Kaj jen iras sur la scenejon la Pomego. La gramatiko de Bertilo Wennergren*, *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko*, mallonge PMEG. Jam de kelkaj jaroj sur la reto, ĝi aperis nun – kun kelkaj adaptaj – libroforme (696 p.). Bildo de pomo surkovrile ilustras ĝian siglon.

En julio 2006, **Monato** (7) publikigis (pli ol) dupaĝan recenzon far Petro De Smedt*, kiu "strebis esti objektiva": *La unua Zamenhof-monumento de la 21a jarcento: dika Pomego!* En novembro sekvas ĝin recenza eseo de Alen Kris en **La Ondo de Esperanto**: *Amaraj provoj*, artikolo pli longa ol la ĵus menciita, ja kun preskaŭ triobla longo (kaj do sufiĉe detalema). Per la unua ni konkludu pozitive, per la dua negative. Mi ne elektos partion, nek por nek kontraŭ. Mia celo estas alia: diri ion pri verko de Kamiel Vanhulle*, pli konata alinome, pro sia ŝerpijoa* disstudado sur lingvistika, astronomia kaj metafizika kampoj. Tamen, Manuel Halvelik ne verkis gramatikon sed – krom "Universala Skribo" kaj "Universala Esperanto" – universalan terminologion.

De Smedt, kun Stefan Maul*, apartenas al tiu skolo laŭ kiu – se tiel diri – la 16 reguloj sufiĉas. Mi, male, opinias, ke eĉ PAG ne konsilas pri ĉio. PAG tamen donas tre multon; sed iuj gravaj detaloj estas lokitaj kvazaŭ en kaŝejoj: ekz. la (senakuzativa!) taksa kaj ilustra 'kiel' troviĝas en Rimarko IV, sub § 200 (4a eldono, 1980). Kontraŭe, mankas la bela ekzemplo, kiun Waringhien metis en iun piednoton de eseo, por pravigo de memstara 'unun', kontraste kun la senakuzativa numeralo en objekto.

Ordinaraj esperantistoj ofte plendas pri netroveblo de klarigo; certe, la fakterminoj kutime fortimigas nefakulojn. Ĉu ilin peli al studo? Kvankam verŝajne konscia pri sia 'malbona sinteno', Daphne Lister* demonstris la bagateligan konduton per poemeto:

Herezo.

PAG postulas tro da pago,
Kaj entenas tro da blago.
Se vorton mi facile uzas
Kontroli PAGE nur konfuzas.
Se tempon mi kaj monon ŝparas,
Ne trovas mi, ke mi eraras.
Prefere cedi pri ĉi ĉio,
Kaj resti en feliĉ' sen scio.

Sed kio pri semantiko?

Intertempe – kaj ĝustatempe? – diskuto pri la semantika internacieco revigliĝas en nia gazetaro. Atentigoj, avertoj, alarmoj kaj plendoj pri devojiĝoj sur la semantika kampo oftigiĝas. Minaco venas ne nur de la angla, kiu efektive influas superforte (preskaŭ ĉiam malavantaĝe) ĉiujn eŭropajn lingvojn, sed ankaŭ de alilingvaj paŭsoj kaj transprenoj: vort-adoptoj. Precipe la angla tamen koruptas fremdajn lingvojn, trudante al internaciaj vortoj novajn signifojn, ĉu leĝere modifitajn, ĉu plene aliajn. Ni donu pli da atento al tiu problemo. En diversaj landoj, ankaŭ en Belgujo, aperis tradukoj de *The Delta Deception* de la trolaŭdita Dan Brown*. La tradukinto gardis la aliteracion: *De Delta-deceptie*, sed forgesas ke nederlanda 'deceptie' preniĝis el la franca 'déception' (elreviĝo), kaj ne el la angla 'deception' (trompo). Kontrolu per la vortareto de Wells kaj tiu de Léger-Albault. Unu donas: trompo, la alia: elreviĝo, seniluziigo, trompiĝo; tiuj signifoj ne egalas.

Jen! En **Literatura Foiro** (223 – oktobro 2006) denove: *Internacieco semantika, ne nur leksika*. La nova PIV malsufiĉe difinas sinonimojn! Mi citas: "Ĝi devus emfazi distingajn nuancojn, malkongruojn, signifohierarkion, sed ne limigi sin al simpla listigo. Cetere, ĉar Esperanto estas "lingvo internacia", ĝi devus strikte observi la internaciecon de la t.n. internaciaj vortoj, ne lasante ilin drivi al etnosignifa kaoso. [...] Ne sufiĉas (laŭ la 15a regulo internaciajn vortojn aŭtomate adopti kaj (adapti laŭforme), necesas ankaŭ fiksi ilin signife. [Tiam] esperanto fariĝus inda rivalo de la angla kun ties kaosa kripligo de aŭtentaj tradiciaj signifoj de internaciaj vortoj. [...] En la orienta ono de Eŭropo, pri internacieco rivalas ankaŭ la rusa. Ĝi altrudis cirile kripligitajn internaciajn vortojn al multaj sovetigitaj lingvoj. Ekzemple *abstinenco*, kiu en eŭropa senco estas konscia sindeteno de agrabla sed danĝera afero, tamen en la soveta terminologio signifas malsanon de dependeco, akutan staton pro manko de psik-aktiva substanco." (Valdo Banaitis)

Returne al la pomarbo

Sed ni estis konsiderantaj la Pomegon dume. Fine de recenzo Broadribb diras: "Mi preferas la Esperanton de Wennergren al tiu de Malovec." Ja Wennergren novigis. Tamen fuŝe, mallerte. Ĉu nekompetente? "La pomego ne maturiĝis," konkludas Alen Kris, "ĝia aŭtoro ne solvis sian didaktikan taskon." La pomego tamen tentas, ĉar ties kreinto enkondukis novan terminologion. Sed nek adekvatan, nek konsekvencon; renomado duonefika. Nomoj nepraktikaj, difinoj fuŝaj.

Ĉu levo de brovoj? Ta, ta, ta. Ŝajne la libro estas facile konsultebla: ordinaraj esperantistoj tuj trovas, kion ili serĉas. Nu, tiel do nia movado havas... por ĉiu gusto? Sed kial do eĉ eminentaj aŭtoroj pekas kontraŭ bazaj reguloj? Kaj kial mi jen kaj jen renkontas gramatik-aplikojn pri kiuj mi ne povas konsenti? Ne temas tiaokaze pri propra prefero; mi ja scias: ofte estas pli ol unu ĝusta solvo. Leginte la recenzon de KRIS, mi tamen jam tremetas: ĉar se tia, la libro por mi ne estas kontentiga.

Elvolviĝas terminologioj por infanoj, filistroj, sciencistoj... Ekstremoj sen tertremoj! Unuflanke, la ludeca didaktika nomsistemo de Claude Gacond* en kiu propozicio estas 'raketo', ia spacoŝipo – frazo ja estas pensotransportilo – kaj la verbo estas ĝia 'motoro', la subjekto 'piloto' kaj la ceteraj frazopartoj 'pasaĝeroj': tiuj estas diversaj, kompreneble, kaj karakterizitaj. Ĉiu parto portas ciferon, tiel ke frazo estas prezentebla kiel nombro. Interŝanĝo de la ciferoj en la nombro, forlaso aŭ aldono de cifero, montras modifon de la penso, ĉar signas ŝanĝon de la vortordo aŭ substituon de fraz-elemento. Aliflanke, elvolviĝas nomenklaturetoj por fakspecialistoj.

Parolante pri nova terminologio

Mi tuj pensis pri la verko de Manuel Halvelik: ĉio iel ligita al lingvoj enestas: etnolingvistiko, tipologio, beletristiko, fonologio, semiotiko, semantiko kaj sociolingvistiko; ĉiu kun siaj subdividoj (ekz. metriko, prozodio, stilistiko, retoriko).

Antaŭ mi kuŝas 260-paĝa, A4-formata spiralbindaĵo, enhave ege kompleksa. Krei pri ĝi bildon klaran, kaj samtempe priskribon koncizan, estos apenaŭ eble. Leginte la verkon jam dufoje (1992, 2000), nun (2006) refoliumante ĝin, mi miras pri ĝia riĉeco kaj, precipe, ĝia konsterna logikeco. Sed mondoreversa ĝi estas. Kaj neniun atenton ricevis tiu laboro siatempe. Nu, direndas, emfaze kaj insiste, ke la nova nomenklatureto celas sciencistojn kaj fakulojn. Tamen, vidu, la aŭtoro faris ĉion eblan por komprenigo: la komunlingva, la universal-esperanta kaj la tradicia terminaroj apudas; kaj apogas unu la aliajn. Troviĝas do klara distingo inter komuna, klera kaj specialista lingvaĵoj. Bone. Ĉar la tubero en tiu libro estas jena: kvankam ĝi estas verkita en ordinara Esperanto, la terminoj en ĝi estas en... Universala Esperanto.

Sur la kovrilo: **Nova nomsistemo por lingviko laŭ la projektaro de Manuel Halvelik** / kun enkonduko pri *Kontrasta Triaksismo* – Serio Universala Esperanto n-ro 9 – Unua versio 1992. Sur la frontispico (inter aliaj donitaĵoj) trifoje la titolo: Nova Nomsistemo por Lingviko, Nova Onimopleco por Glotologio, Nova Nomenklatureto por Lingvistiko.

Jen la Indekso: 1. Situigo de lingvistiko; 2. Al la estonteco; 3. Al la estinteco; 4. Origino de la homa lingvo; 5. Lingvofilozofio; 6. Kial nova nomenklatureto pri lingvistiko? 7. Ne-internacia logikeco kontraŭ ne-logika internacieco.

En tiu lasta parto plej grava estas la alfabeto ordigita **Nova vortaro** kun difinoj (p.73-244). Sekvas ankoraŭ du vortlistoj (glosaroj kiuj helpu trovi la vojon), nome: *Terminologia ŝlosilo* kaj *Tradicia terminaro*. En subdivido 7.3 temas pri la aŭtoro U.D.K.-metodo.

Kelkaj citoj ŝajnas al mi necesaj, utilaj, interesaj. La komenco de la ĉapitro 1: "En tiu ĉi kompilaĵo la vorto "lingvistiko" koncernas la sciencon pri esplorado kaj priskribado de ĉiuj lingvoj ajnspecaj, kun la specifa celo atingi plejeble ĝeneralan teorion per

serĉado de trajtoj komunaj al la amasego de kelkmil idiomoj tra la mondo: la universalaj. Mi kaptas la okazon, kiel diletanto (ĉu fikuraĝe?), eksponi proprajn ideojn pri lingvistiko, prepare al specifaj novaj proponoj, unuavice propono pri reformo de ties nomenklaturado. Klaraj konceptoj ja estas antaŭkondiĉo por klaraj envortigoj, kaj klaraj konceptoj siavice dependas de klare konstruita hierarĥia kadro ĝenerala."

Jen ĉerpeto el ĉapitro 6: "La tradicia terminaro de lingvistiko – precipe tiu de gramatiko – estas en tiu perspektivo, laŭ mi, la tutunua fortreso kiun ni devas ataki kaj venki, se ni vere deziras liberigi Esperanton de ĝiaj kaprice eŭropismaj katenoj; tiom pro ĝia centra rolo en ĉiu lingvokomunikado, kiom pro ĝia escepte forta greklatina kiraso. Ja, se tiu timiga fortreso falos, ĉiuj ceteraj terminologiaj fortresoj en la sciencista mondo estos kompare nur kartonaj kasteloj – kun ebla escepto de la komputorika bastiono. Sed tio dependas malpli de la, en tiu ĉi verketo eksponata, revolucia metodo mem, ol de nia **mensa preteco** forskui nian jam centjaran tradicion, hazarde estiĝintan pro la misbakita 15a regulo de la Fundamento."

Kontrasta Triaksismo...

estas parto de ĉapitro 2. Ĝi referencas al baza hipotezo pri nia Universo kiun la aŭtoro starigis en *Akademias Studoj* 1987. Eta cito: "[...] Jena kosme fundamenta, kaj fakte metafizika, skeleto [de la tri spacaj aksoj] manifestas sin do ankaŭ en ĉiuj lingvofenomenoj, indiferece sur kiu nivelo: en fonetiko, fonologio, morfologio, sintakso kaj – plej interese – en semantiko. Por tio mi kreis la terminon "Triaksismo". [...] En la skemo de De Saussure* klare elstaris jam du tiaj dinamikaj direktoj, kiujn ni nun povas identigi kun la du reciproke perpendikle agantaj spacnaturaj aksoj: H (aglutina) kaj Y (fleksia). Mankis nur la tria akso Z kiu, ĝuste pro sia tempa naturo, ne tiel facile montras rekoneblajn formojn. Estu ĝi la moviĝodirekto de la semantiko — la ĉiodetermina, plej grava lingvofaktoro el ĉiuj: ja tiu de la 'kunteksto'."

Manuel Halvelik (evidente) ne verkis gramatikon, sed universalan terminologion. Ĝi povas almenaŭ doni inspiron. Kaj fakte, por trovo de taŭgaj simplaj terminoj, aparte interesa fonto estas la tradicia kaj komunlingva vortlisto (kun akcepteblaj sinonimoj).

Parenteze, iu miro, ia tristecteksa sorĉo surfalas min dum lego kaj pristudo de ĉi 'profundopense pensoza' laboraĵo, ĉar ĝi donas (kun la ceteraj verkoj de la aŭtoro) envidon al menso mirinde unika de mistaksita modestulo. Ĉe la 'U.D.K.-metodo' mi pensis al Paul Otlet*, belga pioniro de scioklasifiko, kaj tiusence antaŭulo en la invento- kaj evoluigoproceso de Interreto. Jen la komenco de la koncerna ĉapitro: "Laŭ mia laika opinio – kiun fakuloj kredeble ne agnoskos – la aktuala gramatika analizado-metodo, per arbostrukturigo, estas tro komplikita kaj malklara. Mi eĉ tiel forte malŝatas ĝiajn "fervojretojn", ke mi decidis se iel eble serĉi alian metodon, pli klaran... almenaŭ por mi."

Mi legis la verkon en 1992 kaj 2000, kaj refoliumis ĝin nun en 2006. Pristudinte, siatempe, la DLT-sistemon*, mi iom konas la tradukcelan fraz-analizon per arbostrukturigo; nur dank' al tio mi finfine komprenas la kialon de la 'UKD-metodo'.

Interrompa novaĵo

Alvenis la decembra numero de **La Ondo**. Ĝi kunportas fortajn reagojn al la recenzo de Alen Kris. Unu diras, ke li ŝtelis la verdan koloron kaj montras bildon nigra-

blankan; poste, ke la vortoj 'aleno' kaj 'kriso' indikas pikilojn aŭ truigilojn, aŭ, se ili estas uzataj je homoj, vundilojn. Mi ankoraŭ ne nomus tion polemiko. En la kritiko de la recenzinto tre multe estas prava. Tielnomitajn insultojn la gramatik-aŭtoro ne prenu personaj; ili koncernas detalojn de la libro. Jen, pri ekzemploj de senobjektaj kaj objektaj verboj, kiuj estas ĝisabsurde prikomentataj: “Pasas pli ol duoncento da similaj glosoj, kiuj faras iom demencan impreson; leganto estas rigardata kiel duonidioto.” Ĉu ne prave? Mi trovas, ke jes. Kaj ĉu 'E-vorteca vorteto' estas taŭga termino por senfinaĵa adverbo; aŭ 'O-vortecaj vortetoj' por iuj pronomoj el la tabelo de korelativoj?

Alia, malpli rekta reago, subtila kaj saĝa, enlumigas la rolon de la Fundamento, kies ekzisto permesas al ni resti tute trankvilaj pri la sorto de la lingvo eĉ post la plej vitriola recenzo pri grava referenca verko. Sen la aŭtoritat-sorba rolo de la Fundamento, la tuta lingvokomunumo sentus devon atingi komunan opinion pri PMEG kaj eventuale pripensi sankciojn kontraŭ la aŭtoro aŭ la recenzinto. Paciga vidpunkto, pro kiu ni danku al Jens Stengaard Larsen.

Kia? — la nova nomsistemo?

La nova nomenklaturado kunmetiĝas el helenaj elementoj. Vi unuavide miros. *Kapvorto* antaŭiras substantivon. Ĝi estas sinonimo por tio kion ni nomas la *artikolo*. Kaj la 'kapvortoj' en vortaro? Nur traduko de la angla "headword". Tiun Halvelik nomas *lemonimo* (aŭ trafvorto); lia *rektronimo* indikas la gvidvorton (supre de vortara paĝo). La sinonimoj malsupre ofte simple tradukas la 'helenan' vorton. Por komparo jen kelkaj el la terminoj:

Tradiciaj	Komunlingvaj	Wennergren	Halvelik
morfemo			leksalo
radiko		radiko	stiptalo
afikso		afikso	pfagalo
artikolo	kapvorto	artikolo	graptolekso
substantivo	nomvorto	o-vorto	ontolekso
adjektivo	ornamvorto	a-vorto	fanolekso
adverbo	situacivorto	e-vorto	terelekso
verbo	agvorto	i-vorto	ergolekso
pronomo	anstataŭvorto	pronomo	lebrolekso
prepozicio	rilatvorto	rolvorteto	neksolekso
numeralo	kalkulvorto	nombra vorteto	aritmolekso
korelativo	tabelvorto	tabelvorto	logolekso
interjekcio	krivorto	ekkria vorteto	frastolekso
onomatopeo	sonimita vorto	sonimito	fonolekso
partikulo	vorteto		haplolekso
propozicio	frazo	frazo	frastalo
konjunkcio	kunliga vorto	kunliga vorteto	kawjunto
subjunkcio	subliga vorto	frazenkonduka vorteto	infrajunto
subjekto		subjekto	ontotagmo
objekto	objekto		dektotagmo

kopulo	helpverbo	helpverbo	ergoboeto
predikato	ĉefverbo	ĉefverbo	ergotagmo
predikativo	ec-frazo	perverba priskribo	ergotagmalo
prepozitivo		aù adjekto	je-kazo
komplemento			teretagmo
interpozitivo			iterotagmo
tenso	temp-indiko	tempo	hronalo
prezenco	as-tempo	nun-tempo	adjohrono
preterito	is-tempo	pasinta tempo	hhtesohrono
futuro	os-tempo	venonta tempo	ŝfahhrono
verba modalo			ajvalo
infinitivo	i-formo	neùtrala modo	ekastajvo
finitivo	konjugacia formo	reala modo	haplajvo
participo		participo	metohhajvo
verba modo			ortalo
imperativo	ordono	vola modo	entoloro
volitivo	necesigo		djonorto
	kapabligo		dinamorto
subjunktivo	eventualigo		ikanorto
optativo 1	intenco		boleorto
kondicionalo	supozo	imaga modo	lambanorto
	kondiĉo		odokajro
optativo 2	deziro		hoptorto
	ŝanco, verŝajneco		hlerorto
aspekto			kajralo
nedaùra			reptokajra
daùra			semprokajra
ripetiĝa			iterokajra
voĉo de verbo			ergalo
aktiva		aktiva	prascerga
pasiva		pasiva	noserga
netransitiva	netransira	senobjekta	intraverca
transitiva	transira, iga, aga	objekta	ekstraverca
epiteto	karakterizaĵo		epitetjo
ekivalento			synonima epitetjo
suplemento			proitagmo
apozicio	apudmeto		fanotagmo
nominacio			iditagmo
genro		sekso	seks-kazo
femineno			in-kazo
maskuleno			vir-kazo
nombro			nombro-kazo
singularo		unu-nombro	unu-kazo
pluralo		multe-nombro	mult-kazo
nominativo		sen rolmontrilo	ĉef-kazo
vokativo		alvoko	ci-kazo / vi-kazo
genitivo			havde-kazo
dativo		nerekta objekto	por-kazo

akuzativo		rekta objekto	ricev-kazo
direkta akuzativo			al-kazo
partitivo		da-esprimo	partec-kazo
komparativo	komparacio	kompara vorteto	komparado-kazo
gradacio			gradiĝo
egaleca			egaleciga
supereca			majoreciga
malsupereca			minoreciga
superlativa			supereciga

* Vitraj ŝuoj: ĉarma semantika eraro iam okazinta en traduko de la franca fabelo, pro konfuzo de du homonimoj: 'verre' (vitro) kaj 'vair' (menuvero).

* Bertilo Wennergren (1956): sveda esperantisto en Usono.

* Petro De Smedt: belgo, farinto de Nederlanda-Esperanta-Nederlanda vortaro.

* Kamiel Vanhulle (1925): pseŭdonime Manuel Halvelik, belgo.

* André Cherpillod: vidu LG 127.

* Stefan Maul: iniciatinto kaj redaktoro de *Monato*.

* Daphne Lister (1921-2003): publikigis du etajn poemarojn: *Ĝis nun* kaj *Poste*. Auld laŭdis ŝian epigraman stilon. La du poemetoj ĉi-kunaj aperis post *Poste*, kun kelkaj pliaj, en *Monato* 1996 / 12.

Od' al Ĝu'

Ĝuo indon ne bezonas,
 Nek honton nek fieron konas,
 Se oni ŝatas, oni ŝatas.
 Nek al ĉielarka prismo
 Nek al sadomasohismo
 Indo rilatas.

* Dan Brown: usona verkisto de kies romano 'La DaVinĉi-kodo' mondvaste vendiĝis 40 milionoj da ekzempleroj.

* Claude Gacond: fondinto de la Kultura Esperanto-Centro en Ĉaŭdefono (La Chaud-de-Fonds), Svisujo.

* Ferdinand de Saussure (1857-1913): fama svisa lingvisto.

* Paul Otlet: interesan dokumentan filmon pri li nelge realsendis la televida kanalo Arte; artikolon pri li verkis Roland Rotsaert, aperigita en *Monato* 3, 2004.

* DLT: Distributed Language Translation (Distribua lingvo-tradukado): sistemo por bona rekta tradukado per maŝino sed sub homa supervizio.

Christian Declerck